

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri Edmond Privat, mondialisto kaj esperantista verkisto.

Unu tagon, en 1903, la gimnaziano Privat alportis en la klason esperantan gramatikon. Post tri semajnoj li jam flue interparolis en la nova lingvo kun sia kamarado Hector Hodler. Ili tiam decidis fondi klubon kaj ĵurnaleton : *La Juna Esperantisto*, kaj por ties eldonaj elspezoj ambaŭ junuloj devis vendi siajn premilibrojn aŭ volumojn de Jules Verne. La redakcio de tiu gazeto sidis dum tri jaroj sur sama benko en la fundo de klaso. Pri tio raportas la libro *Vivo de Hector Hodler*. En ĝi ni ankoraŭ legas, ke dum la lecionoj pri matematiko niaj du herooj gluis poŝmarkojn, skribis adresojn aŭ legis patrajn leterojn de profesoro Cart aŭ d-ro Zamenhof.

La eldonejo *Stafeto* ĵus aperigis la personajn rememorojn de Edmond Privat sub la titolo *Aventuroj de pioniro*. Dank'al tiu libro faktoj kaj heroaĵoj lumiĝos, faktoj kaj heroaĵoj ĝis hodiaŭ mistere frustrataj inter la esperantistaro. Legante tiun aŭtobiografion vi konstatos, ke la veraj faktoj ofte superas la legende frustratajn.

Edmond Privat partoprenis la unuan Universalan Kongreson en Bulonjo-ĉe-Mar. Vi certe scias, ke ĉe tiu manifestacio nia gimnaziano invitis la esperantistaron kongresi la sekvan jaron en Ĝenevo !

Tiu kongreso en Bulonjo ne nur influis la vivon de nia movado, sed certe ankaŭ tiun de Edmond Privat. Bulonjo : kiom da fojoj ni trovas tiun nomon en liaj verkoj kaj prelegoj. Tri entuziasmaj ĉapitroj de *Historio de la lingvo Esperanto* priskribas tiun manifestacion, kie « *ia mirakla pentekosta ĝojo kaptis* » ĉiujn partoprenantojn. La parolado de Zamenhof ne estis nur belaj vortoj por nia juna pioniro, sed viv-idealo, kiun li rapide personigos. « *Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ, inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Mar, kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.* » En la ĉefverko de Edmond Privat, tiu pensoriĉa *Vivo de Zamenhof*, kie, kiel ĉe la franclingva verko *Vie de Gandhi*, la biografo spirite kaj pense formas tuton kun sia heroo, subite, en kvazaŭ mistike emociiga paĝo la aŭtoro reaperas. Tiu paĝo koncernas la miraklon de Bulonjo. Li prononcas preĝvortojn, kiuj realiĝis :

« *Ho, premo de Bulonjo, sekvu min ĝis tombo !* »

Dank'al la kuraĝa sindono de niaj du gimnazianoj la dua Universala Kongreso en Ĝenevo plene sukcesis. Sed vi povas imagi, ke ne estis facila tasko loĝigi kaj kontentigi 1200 kongresanojn dum tuta semajno.

En Ĝenevo Zamenhof defendas la « internan ideon » kontraŭ la tendenco, kiu volis vidi en esperanto nuran lingvon. « *Kun tia esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni havas nenion komunan* » indignas la Majstro. Tiun indignecon profunde partoprenas nia juna ĝenevano, nia juna homarano.

La postan jaron ni trovas nian heroon en Kembriĝo. Li estas trapasinta sukcese siajn ekzamenojn kaj partoprenas al la organizo de la tria Universala Kongreso. Denove lin riĉigos la parolado de Zamenhof. Ni devas citi tiun frazon, kiun la tuta vivo de Privat personigos : « *Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj gentoj povus pace kaj frate interkomuniki ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn.* »

Nun nia junulo estas matura ne nur lingve, sed ankaŭ filozofie. Lin ni trovas dum la Delegacia afero en Parizo. Aŭskultu fragmentojn el *Aventuroj de pioniro* :

« *Profesoro Carlo Bourlet kondukis min al la ĉefo de la eldonista firmo Hachette, s-ro Breton, kiu serĉis iun agenton por veturi Usonon kaj rilati kun nord-amerikaj eldonistoj. Ili proponis al mi tria-klasan revenbileton por ŝipo ĝis Nov-jorko, se mi akceptus la taskon viziti*

firmojn tie kaj reveni por raporti. Estante nur dek-ok-jara mi devis veturi hejmen por peti permeson de gepatroj kaj aŭdi denove, ke mi estas tro juna. Tamen ili fine konsentis. »

Edmond Privat el la ŝipo anoncas sian alvenon en Nov-Jorko al la ĵurnalistoj per la pres-agentejo. Lia telegramo efikas, kaj ĵurnalistoj venas lin intervjui ĉe lia alveno. Mi ankoraŭ foje citas Edmondon Privat :

*« Ĉu oni povas verki poezion en tiu nova lingvo ? demandis ĵurnalista kaj naive mi citis strofon de unu el la poemoj, kiujn mi poste presigis en mia libreto « Tra l' silento ». La postan tagon aperis plena kolono en la nov-jorka gazeto **Sun** laŭ iom ŝerca tono, rakontante pri versoj en kiuj sonis vortoj kiel gondolo, fluto, melodio kaj muziko. La ĵurnalista esprimis la esperon, ke la prezidanto eble invitos la knabon en Washington por lerni lingvon en kiu li povus pli facile interparoli kun rusoj kaj japanoj kaj eble klarigi al fremdaj popoloj, kiom da malfacilaĵoj li havas kun milionuloj kaj financaj reĝoj. »*

Mi esperas, ke mi invitis vin legi tiun humurplenan aŭtobiografion. En ĝi vi legos, kiel nia pioniro vizitis la prezidanton Roosevelt kaj prelegis antaŭ universitataj studentoj en Harward universitato, en kiuj cirkonstancoj li decidis dediĉi ĉiujn siajn fortojn al la disvastigo de nia lingvo kaj ties interna ideo rifuzante eblecon fariĝi rapide milionulo.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la alveno de la juna Edmond Privat en Nov-Jorko. La venontan semajnon ni daŭrigos nian prelegon pri Edmond Privat, mondialisto kaj esperantista verkisto, unue per la lego de la poemo *Tre dolĉe sur lago*, kiun li legis al la ĵurnalistoj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-